DIA REGNO
ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

✪ dumonata kristana revuo en esperanto ✪ n-ro 3 (852) ✪ 2005

16-23 julio 2005
Pilis-csaba
Ekumena Kongreso
IKUE - KELI

## La loka kongresa komitato bonvenigas vin al Piliscsaba



KASZAB Erzsébet — BAGI Irén — KÓBOR Lajos — FARKAS-TATÁR Éva

## KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*



**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021;
💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Els VAN DIJK-KUPERUS
✉ Koningsmantel 4,
NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando;
✆ +31 1724 20222;
💻 e.a.vandijk@hetnet.nl

**Kasisto**: Siegfried KRÜGER
✉ Dinkelsbühler Str. 12,
DE 74074 Heilbronn, Germanio;
✆ +49 7131 162688;
💻 SLKrueger@gmx.de



**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- ✪ Membro-subtenanto €30,- ✪ Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- ✪ pagante al Libroservo €18,- ✪ Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. ✪ Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI ✪ Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

## DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908 dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Heimdalsvägen 24,
S 149 32 Nynäshamn, Svedio;
✆ +46 (8) 52016816;
💻 dr_boarad@yahoo.se

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel Polnický, Na Vinici 110/10
✉ CZ 290 01 Poděbrady **II**, Ĉeĥio;
✆ +420 325 615 651;
💻 Cea.polnicky@quick.cz

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz


## ENHAVO


| | |
|---|---|
| KIEL VENKI ENVION? | 51 |
| LA REGNO DE DIO | 52 |
| MERKREDO - 2A DUONO | 53 |
| SEKRETARIA JARRAPORTO | 59 |
| TAGORDO DE LA JARKUNVENO | 61 |
| LA ESPERANTA DI-SERVO LONDONA | 62 |
| MI ESTAS KIU ESTAS – PARTO 3 | 63 |
| EL LA KONGRESA PROGRAMO | 64 |
| ESTRARANO KAJ SEKRETARIO | 66 |
| FINANCAJ RAPORTOJ | 67 |
| INFORMETOJ | 70 |
| MEMORE AL ANNA-LISA AHLRÉN | 71 |
| EKUMENECO | 72 |


## REDAKTORAJ VORTOJ

Iam C. S. Lewis, prof. ĉe la universitato de Cambridge, alparolis la foriran klason pri iliaj estontaj membrecoj en diversaj grupoj kaj rondoj. Kelkaj rondoj postulas ian 'kotizon', monan aŭ alispecan, por akcepti novajn membrojn. Kelkaj el tiuj rondoj estas alte taksataj.

Sed ekzistas ankaŭ aliaj rondoj kiuj povas spontane formiĝi en kiujn oni sentas sin tuj akceptata kaj bonvenata. Tiuj rondoj baziĝas sur sama aŭ metio aŭ ideo aŭ kredo. Oni nur simple estas 'unu inter ni/ili'. Kaj aliaj 'kotizoj' ne necesas.

Espereble ni sentos en Piliscsaba tiun etoson pri kiu Lewis parolis, ke ni estas 'unu inter ni', kiam ni somere kongresos kune, venantaj el multaj direktoj kaj kutimoj sed tamen kunligataj per baza kredo je Jesuo Kristo.

# Kiel venki envion?

Larisa KUZMENKO, Rusio

Envio malutilas al ni en nia propra bonstato. Ĝi senigas nin je spirita paco, trankvileco kaj ĝojo. Ĝi faras sanan homon malsana kaj feliĉulo fariĝas malfeliĉa.

Ĉi tie estas utila la konsilo de la sanktulo Vasilio la Granda pri tio kiel venki envion en homoj:

*"Se via menso ekvekiĝos per la menso pli granda ol la homa menso, vi honoros nenion teran grandan kaj eksterordinaran, – nek tion, kion la homoj nomas riĉeco, nek velkantan gloron, nek korpan sanon; se vi ne vidos bonon por vi en la rapidpasantaj aĵoj, sed se vi celos vian rigardon al la vere bela kaj laŭdinda, al la atingo de la eternaj kaj veraj bonoj, vi estos malproksime de ĝuado pri io tera kaj putranta. Al tiu ja, kiu ne estas frapita per la mondaj grandecoj, al tiu neniam povas proksimiĝi envio."*

## La protektantino de studentoj

En Ruslando estas multaj kristanaj festoj, ligitaj kun la nomoj de la sanktuloj, ekzemple: Ilja tago, sankta Nikola tago, Tatjana tago. La sola nomo de Tatjana estas ligita kun la vivo de studentoj.

Tatjana – sanktulino kaj martirino loĝis en la antikva Romo en la IIIa jarcento. Ŝi estis la filino de riĉaj gepatroj kaj estis edukita en la kristana kredo. Ŝi estis firma en sia kredo. Ŝi nomis sin "fianĉino de Kristo".



Tatjana estis diakonino en unu Roma templo. En la jaro 226 dum la regado de la imperiestro Aleksandro Sevir (222-235) ŝi estis kaptita kaj turmentita. La signoj de la forto kaj vero de nia Sinjoro Jesuo Kristo aperis dum la turmentado de Tatjana kaj multaj homoj kristaniĝis pro tio. Laŭ ŝiaj preĝoj ruiniĝis la statuoj de la paganaj dioj kaj la kruelaj turmentoj ne suferigis ŝin. La kruelaj kaj laciĝintaj juĝistoj ĉesigis la vivon de Sankta Tatjana per la bato de glavo kaj kune kun ŝi ili ekzekutis ŝian patron.

En la "Pravoslava kalendaro" la nomtago estas glorigita kiel fondado de la Moskva Universitato. En 1755 la imperiestrino Jelizaveta Petrovna faris ukazon pri la fondado de la universitato.



Do, la 25an de januaro oni festas Tatjanan tagon aŭ la tagon de studentoj. Dum la tago en Ruslando okazas diservoj en temploj kaj solene la profesoroj ricevas premiojn por sia nobla laboro kun studentoj. Fine de la 19a jarcento la feston

oni celebris ne nur en Moskvo, sed en aliaj superaj lernejoj. Denove larĝe oni celebras la tagon komence de la jaro 1994 post la Soveta periodo.

### La sanktulo Ignatij Brjanĉaninov

La sanktulo Ignatij Brjanĉaninov (laika nomo Dmitrij Aleksandroviĉ) naskiĝis la 6an de februaro 1807, en la bieno de sia patro, en la vilaĝo Pokrovskoje, Vologda gubernio. Li estis riĉe naturdotita pri multaj talentoj kaj faris sukcesojn en lernado. Tamen nek scienco, nek laika vivo kaj filozofio povis kontentigi lian spiritan soifon. Li vizitis diservojn en Aleksandro-Neskaja monaĥejo kaj trovis tie instruistojn laŭ siaj bezonoj. Sub ilia influo li monaĥiĝis. Dum 24 jaroj Sankta Ignatij estis la prioro de la Sergiaj dezertaj preĝejoj apud S. Peterburgo kaj en 1857 li fariĝis episkopo en Kaŭkazo. La lastajn jarojn li pasigis en Nikolo-Babajeva monaĥejo apud la urbo Kostroma.

La spirita recepto de Ignatij Brjanĉaninov:

*"Mi sendas al vi la recepton spiritan kaj konsilas al vi uzi la proponitan kuracilon kelkfoje dum tago, precipe dum la minutoj de la akraj, korpaj kaj animaj suferoj. Post tio vi trovos por vi kuracan forton kaj resaniĝon. Kaj tio fortigos en vi humilecon kaj kredon. Kiam vi estas sola prononcu malrapide kaj laŭte al vi mem la vortojn: 'Gloro al Vi, Dio mia, por la sendita malĝojo, kiun inda pro faroj miaj, mi prenas: memoru min en Regno Via!'"*

& & &



Nia Ortodoksa Eklezio instruas, ke ni devas preĝi por niaj malamikoj. La voko de la Eklezio estas *"Malamu pekon, sed amu pekulon*". Do, ni povas juĝi la agon de homo, sed ni ne povas juĝi la homon.

## La Regno de Dio

Kaj kiam la Fariseoj demandis al li, kiam venos la regno de Dio, li respondis al ili, dirante: La regno de Dio ne venas kun observado; kaj oni ne diros: Jen ĉi tie, aŭ: Jen tie! ĉar jen la regno de Dio estas inter vi.

Luk 17:20-21

# MERKREDO

## 2A DUONO

Gerrit BERVELING

Kion ekzakte mi prenu? Mi predikas preskaŭ ĉiudimanĉe, dekkvarfoje jare en la preĝejo de nia komunumo, kie mi loĝas, sesfoje jare en aliaj preĝejoj, kie mi regule deĵoras ankaŭ por pastorecaj taskoj, vizitoj, ĉu hejme ĉu en malsanulejo, ktp. La ceterajn dimanĉojn, kiam mi predikas, mi tion faras en pluraj aliaj urboj. Laŭ invito de la loka preĝeja gvidantaro. Estas neniel eble, ke unu sola homo vortigu plene ekzakte tion, kion Dio volas por ni homoj. Eĉ se plej sincera, ĉiu homo ja neeviteble ion pretervidas, ne sufiĉe emfazas, preterlasas. Tial estas bone, jam tute laŭprincipe estas bone, se la homoj de l' lokaj komunumoj, se ili regule iras al la diservoj, aŭskultu regule malsamajn homojn prediki. Ne estus bone, se oni iĝus dependa tro multe de nur unu flanko de interpretado de la mesaĝo de Dio.

*Estas neniel eble, ke unu sola homo vortigu plene ekzakte tion, kion Dio volas por ni homoj. Eĉ se plej sincera, ĉiu homo ja neeviteble ion pretervidas, ne sufiĉe emfazas, preterlasas.*

Konatojn mi salutas surstrate. Konatoj min salutas. Tiel okazas niaurbe.

– La okuloj iel malboniĝis lastatempe, ŝi diris; mi nun kapablas legi sole nur kun granda peno, kaj kondiĉe ke la literoj grandu. Kun sufiĉa interspaco. Antaŭ du monatoj mi ankoraŭ tute flue legadis eĉ ĉi grandecon — kaj ŝi montris libreton poŝformatan kun literspeco liliputa. — Sed relative subite, mia klarvido malakriĝis. Kuracisto — nu, tia naturkuracisto, diris, ke verŝajne mi ploras ne sufiĉe — liasupoze miaj larmotuboj obstrukciiĝis pro neuzataj larmoj. Kaj, kvankam nenion mi diris al li pri miaj travivaĵoj de la lasta jaro, tre povas esti, ke iel li trafis ĝuste la kernon. Li atente, helpe de lampeto kaj lupeo, pristudadis miajn okulojn kaj konstatis, ke ĉio aspektas fakte normale. Do, kiel dirite: psika kialo, nesufiĉa plorado.

Mi ĉirkaŭrigardis tra la ejo, rustika etoso, belaj eksmodaj sed zorge kunigitaj mebloj, du tri pentraĵoj malnovstilaj en obtuze ruĝaj kaj flave–verdaj nuancoj. Domo, kiu ion havas, certan karakteron.

– Ni loĝas en ĉi ĉirkaŭo nur dekkelkajn jarojn. Antaŭe en tute alia parto de la lando ni havis niajn okupojn. Mia edzo tiam ankoraŭ estis memstara pentristo sukcesa, specife portretojn li faris — knabovizaĝon ĉarman por la naskiĝdatreven' de l' panjo; filo kaj edzo ege singardis nenion malkovri antaŭtempe al ŝi. Aŭ junajn geedzojn — por super la kameno; ĉefe en riĉaj snobaj rondoj tio estas daŭre ankoraŭ petata temo,

ŝatata. Aŭ se ĵaluzis viro, suspektante l' edzinon pro la rilato kun ŝia kuzo, juna husaro loĝanta en urbeto tuj proksima, foje okazis ke li ricevis komision fari portreton de misformita husaro galopanta inverse surĉevale, kun la vosto kramfe tordita inter la fingroj. Vera majstraĵo fariĝis… Kaj, ĉar la geedzoj ĵus repaciĝis, la mendinto ne plu deziris la tolon, kaj petis ke li reaĉetu ĝin je prezo rabatita. Ĉar kompreneble, tiajn tiom specialajn mendojn li kutime igis pagi anticipe. Kiu scius ĉu alie li ja kapablus vendi ĝin? — Per la husaro misprezentita li tamen estis tre feliĉa; ĝi lin eĉ riĉigis — per premio. Dum ekspozicio de eksterlandaj nekonataĵoj, en kiun kaŝe li ĝin kontrabandis. Poste li transprenis butikon de laktovendisto — estis kvazaŭ unu lia revo, jam de knabaĝo: li deziris esti plene propra mastro, memstara. Do — la butikon — sed ho ve! Kiu nenion scias pri komerco, ne komencu tian ŝercon! Terura misrezulto. Post du jaroj forkonsumiĝis komplete niaj plenaj pli ol tridek sep aŭ ok mil guldenoj, kiujn dum la antaŭaj jardekoj ni estis amasigintaj, ho kun kiom da ŝvito kaj penado! Imagu do!

*Kiu nenion scias pri komerco, ne komencu tian ŝercon!*

Nu, fiasko, bankroto… En tiu periodo mi komencis verki por taggazeto. Etajn raportaĵojn pri negravaj festetoj kaj novaĵoj de la urbo. Vi ja scias, sen kontrakto, laŭprove, hazarde. Jam mezlerneje mi ŝategis la verkadon. Do, kial ne tion mi provu? Post kelkaj semajnoj mi subtenis finance nian tutan mastrumadon. Mia edzo tiutempe estis en sufiĉe nigra valo de deprimo, dum sep ok monatoj, mi kredas. Li senfare iom vagis ĉirkaŭ la domo, nenion entreprenis, dormadis ĝistagmeze, frue enlitiĝis, ĉiam grumblis se ne tuj mi lin sekvis por varmigi liajn fridajn krurojn, kiel li ĝin nomis. Mi ne plu emis je seksado, por mi ĝi estis perdinta ĉian apetiton. Sed por li ŝajne ĝi estis la lasta savilo, la laste tenata fadeno. Do, mi lasis lin fari. Antaŭ dek tri jaroj ni ekloĝis ie en tiu direkto, — svage ŝi mangestis en la lumatan polderon — sur farmbieno, meze de l' senfina libero. Li tuj komencis bredi hundojn, purrasajn. Mi ne sciis antaŭe ke li interesiĝas pri tio. Kaj pensiejon por hundoj, vi scias, kien la homoj portas siajn hejmbestojn, kiam la mastro iras skii Svislande aŭ kiam per aŭto ili intencas kelksemajne vagadi tra Eŭropo. Tiam la karan kvarpiedulon kompreneble ili ne plu povas uzi, sekve — kion fari? Lasi sola hejme, ne eblas. La najbaroj pli poste tion ree kaj ree diradus riproĉe. Do pensiejo estas taŭga solvo, socie

*“Tiam la karan kvarpiedulon kompreneble ili ne plu povas uzi, sekve — kion fari? Lasi sola hejme, ne eblas. La najbaroj pli poste tion ree kaj ree diradus riproĉe. “*

akceptata. Ni gajnis multe da mono. Nia ejo baldaŭ disfamiĝis kiel tre altkvalita. La bredado — bedaŭre — montriĝis denova miskalkulo; perdo de pluraj miloj… Sed la ejo… Mia edzo havis kvazaŭ kunnaskitan senton, se temis pri la bestoj. Eĉ plej sovaĝajn hundojn, kiujn la mastro mem apenaŭ sciis regi, li en semajno havis dolĉe karaj… Estis unu el niaj plej grandiozaj epizodoj…

– Via vivo, mi intermetis, estis tre varia. Kuraĝe, je tia aĝo forlasi ĉion kaj ekvivi tute novan direkton…

– Eble ja, sed aliflanke: kion alian fari? La butiko estis fiasko — pentrado ne plu prosperis al li. La inspiro simple rifuzis reveni, li diris. Sed nu… Ni estis interkonsentintaj, ke de tie ni transloĝiĝos al ĉi tiu domo, tuj kiam li fariĝos pensiulo. Sesdekkvin–jara. La kutima aĝo por retiriĝi. Fakte ĉi tiun dometon ni jam aĉetis jardekon antaŭ ol tie ĉi apude ni serioze ekloĝis. Estis nia ĉiujara somera restadejo, dum la enurba vivado… Kaj, kiam sur la bieno tiea ni loĝis, ofte, ire aŭ vene je la butikoj en la vilaĝo, ni pasis laŭ ĉi tie kaj diris enpense: Jen nia baldaŭa ripozejo, kiam ni estos pensiitaj…

> *Li ŝajnis freneza, foje. Nenio lin plu atingis, nek blasfemo, nek kareso, nenio…*

Kiam li fariĝis sesdekkvin-jara, unu monaton antaŭe ni havis gravajn problemojn en A*, ĉar mia oldega panjo (naŭdekunu–jaraĝa) fariĝis ege problemiga: la oldulejon ofte ŝi forlasis dumnokte en sia piĵamo, kaj poste, tute lacan, foje eĉ plene trempitan de la pluvo oni ŝin retrovis en alia, al ŝi plene fremda kvartalo de l' urbego. Mi tien trajnis, kaj en A* mi estis devigita restadi entute eble ses kaj duonan monatojn. Mi zorgadis pri ŝi, provis konvinki ŝin, ke la nuna oldulejo ne plu tiom taŭgas por ŝi, ke prefere ŝi transiru al *Sankta–Martino*, kie la olduletojn ankaŭ dumnokte oni priatentas … nu, por mallongigi longan historion: finfine ŝin mi konvinkis. Ŝi kvietiĝis, akceptis miajn proponojn. Sed daŭris ankoraŭ pli ol monaton antaŭ ol finfine oni ŝin povis enhejmigi en la nova domo. Nu, en *Sankta–Martino*, ŝi bonege fartis. Ĉar al ŝi la cerbo bone funkciis, ŝi baldaŭ fariĝis ano de la plenumkomitato — kaj dufoje feston ŝi kunorganizis, unu eĉ kune kun ekskurso al Bruĝo! La alian fojon ili vizitis Antverpenon; tie pro ia hazardo ili trafiĝis en malĝustajn stratojn, en la ĉirkaŭo de la haveno, mi supozas. Sidis tie malantaŭ la fenestretoj la konataj ĉarmulinoj. Diris unu el la oldulinoj: Ho kiel vivrealecaj aspektas nuntempe la manekenoj de l' modo–butikoj: — Nu, sed por reiri al mi mem: kiam finfine post pluraj monatoj mi do rehejmiĝis, mia edzo denove estis en plena deprimiteco. Li ŝajnis freneza, foje. Nenio lin plu

> *Kuraĝe, je tia aĝo forlasi ĉion kaj ekvivi tute novan direkton … — Eble ja, sed aliflanke: kion alian fari?*

atingis, nek blasfemo, nek kareso, nenio… Apatie li sidadis dum tagoj, por tiam subite frenezumi — kriante, eĉ ĵetegante per kio ajn tra la domo. Estis terure. Infere. Eble parte estis mia kulpo, ke mi tiom insistis, ke ekzakte je la tago interkonsentita, tuj kiam li sesdekkvinjariĝis, ni transloĝiĝu al ĉi tiu domo. Eble mi ja tro insistis. Kun iom pli da pacienco, mi, eble — kiu scias — estus gajninta iom… Sed okazis ja kio okazis. Nenio plu fareblas.

Tiam, la sepan de januaro, subita sciigo: mortis mia panjo: Absolute ne antaŭvidite. Neniu ĝin atendis ĝuste tiam! Ŝi ja tiom feliĉis en sia nova ĉirkaŭo, tiel entreprenema, aranĝante vesperojn kaj posttagmezojn por la ceteraj loĝantoj de *Sankta–Martino*… Mi tien iris, aranĝis ĉion pri la enterigo, ĉerkon, tombo–monumenton, postlasaĵon… La tutan amason da ĝenaĵoj kiuj atakas postvivantojn. Kaj kiam kelkajn tagojn pli poste mi revenis (al telefonalvokoj neniam mi ricevintis reagojn, oni ne dekroĉis la aparaton, sed pro l' okupiteco tion mi ne estis atentinta…) — la edzo estis for. Tutsimple malaperinta! Poste venis poŝtkarto kun nova adreso, je la alia flanko de la lando. Li komencis tie butikon kun tapiŝoj. Li bezonis la ĉiutagan kontakton kun la klientoj…

„— la edzo estis for. Tutsimple malaperinta! Poste venis poŝtkarto kun nova adreso, je la alia flanko de la lando. Li komencis tie butikon kun tapiŝoj."

Leterojn mi skribis, mi telefonis — reagoj ne estis. Li estis for, li restis for. Jen mia nuna stato: sola, vidva — jes, sed mia edzo ankoraŭ vivas. Mi nur ne scias, kie. Ĉar pasintsemajne mi vizitis lian nunan loĝlokon, almenaŭ tion mi planis. Staris lia nomo sur la pordoŝildeto. Sed li mem, laŭ najbaroj, tie jam de semajnoj ne plu troviĝis. Li malaperis. La butiko bankrotis. Fiasko. Ree. Li mem foriris, onidire, piede, kun eta kofreto enmane. Direkte al la stacidomo.

Ekstere kelkajn minutojn mi nur senvorte sidadis en la aŭto antaŭ ol hejmeniri.

Kiam mi estis hejme, mi faris notojn pri la dimanĉa diservo. La temon mi fiksas. Kantojn mi elektas, kiuj taŭgas pli malpli al ĝi. Estas ofte malfacile trovi taŭgajn tekstojn en la Kantlibro… Tamen, mi trovas ilin. Ankaŭ ĉifoje… Mi telefonas al la orgenisto, donas al li la indikojn, por ke li provludu ilin kaj por ke li havu la eblon, se dezirate, provkanti ilin ankoraŭ ĵaŭdovespere kun la kantĥoro. Tiu ja kunvenas ĉiun ĵaŭdovesperon.

Mi preparas la vespermanĝon. Kune kun la infanoj mi manĝas. Ili multe rakontas pri la tagaj travivaĵoj en la lernejo kaj kun geamikoj. Vespere hodiaŭ mi ne bezonas okupiĝi pri la servico– lavado; ne estas mia vico. Mi iras supren al la studejo, iom legas ankoraŭ en la raportaĵo pri la Sinjormanĝo, kaj kiam vokas la pli juna filino, ke „jam estas tempo, ĉu vi ne forgesas?" — mi rigardas la brakhorloĝon,

revokas: „Dankon, mi ja forgesis preskaŭ…” kaj hastas malsupren laŭ la ŝtuparo. En la granda ĉambro mi prenas miajn aŭtopaperaĵojn, salutas la infanojn perkise, kaj enaŭtiĝas. Ek al la urbo D*….

Kiam mi sonorigas, malfermas la pordon juna virino, en ĉarme somera vestaĵo.

*— Alia afero, mi intervenis: Se vere vi deziras, ke ni baptu vian bebon, kial ne samtempe vin mem, Frits…?*

– Bone ke vi jam ĉeestas!, ŝi diras. – Ni ja havas demandon por vi, kiun fakte ni ne ŝatus meti en la plenon: bonvolu eniri. Frits estas en la ĉambro.

Mi demande levas la rigardon al ili: Kio do? Ja ne problemoj, esperebl e?

– Ne, sed… mi estas graveda… kaj mi ŝatus, ke vi baptu la bebon, kiam ĝi estos naskita. Ĉu tion vi volas fari? aldonas Frits.

– Pri tio ni devos serioze paroli, mi reagis; ion tian oni ne traktu en du tri minutoj. Ni fiksu daton…

– Kial? vi ja povas tuj diri, ke jes aŭ ne…

– Ne estas tiel simple. Multe dependas de tio, kial vi demandas ĝin al mi… vi ja estas romkatolika, ĉu ne?

Agnes kapjesis.

– Kaj vi, Frits, vi ne apartenas al, vi ne membras en kiu ajn eklezio… do kial ĝuste al mi vi starigas tiun demandon? Kial ne al romkatolika pastro?

– Nu, ja, …ni partoprenas ja en ĉi tiu grupo…, ĉu ne? kaj…

– Alia afero, mi intervenis: Se vere vi deziras, ke ni baptu vian bebon, kial ne samtempe vin mem, Frits…? vi ja estas ne–baptita… ĉu vi opinias grava, aŭ ĉu nur senchava… aŭ kiel diri: ĉu vi volas baptigi vian infanon… kaj mem resti ne–baptita? Estas bone, se vi estas ne–baptita… kiel homo vi ne valoras malpli ol kiu ajn baptita… por Dio la diferenco ne gravas, mi supozas… Dio amas ja ĉiujn homojn senescepte, kun bapto aŭ ne… sed kial bapti bebon…? Aŭ ĉu nur ĉar viaj gepatroj, Agnes, ĝin ŝatas? Kaj kial ne pere de romkatolika pastro…?

Sonis la sonorilo pordeja.

– Ni fiksu daton por la sekva semajno, se eble, por pli funde priparoli tion, mi verdiktis.

Ni prenis la agendon, serĉis daton.

Ree sonis la sonorilo.

Frits malfermis la pordon. Tuta grupo envenis; ili survoje alprenis unuj la aliajn, nun la aŭto tute plenis… Baldaŭ denove aldoniĝis al la areto kelkaj aliaj. Entute dek tri junuloj, dudek– tridekjaraĝaj… kelkaj iom pli aĝaj… sed kore junaj. Junaj adoltoj. Kelkaj ne havas partneron, du venis senpartnere (Guido: „Ni ne trovis iun por varti la bebon ĉi–vespere”), ĉiuj amike sin intersalutas. Ili parte apartenas al romkatolika aŭ nederland–reformacia eklezio, parte al la remon-

*Ili parte apartenas al romkatolika aŭ nederland–reformacia eklezio, parte al la remonstranta, kelkaj oficiale eĉ tute al neniu eklezio.*

stranta, kelkaj oficiale eĉ tute al neniu eklezio. Fakte tiu ‘aparteno’ relative malsamas laŭ eklezia tradicio: ĉe multaj eklezioj la nura bapto sufiĉas por fariĝi membro de l’ koncerna eklezio, eble eĉ preskaŭ ĉie. Sed ĉe la remonstrantoj, ĉi eta liberala eklezio tipe Nederlanda, tute eĉ ne eblas fariĝi membro pere de bapto. Oni eĉ povas plene membriĝi *sen* bapto. Supozeble tio estas la sola eklezio kristana, kie tio eblas. Oni ja povas esti baptita, same infanoj, eĉ beboj, kiel adoltoj, sed pere de la bapto laŭ nia kredo oni membriĝas en la „Eklezio de Jesuo Kristo” kaj laŭ nia kompreno neniu el la multaj homfaritaĵoj kiujn ni nomas eklezioj estas *la* „Eklezio de Jesuo Kristo”: tio estas transcendaĵo kiun oni ne reale renkontas ĉi–tere. Se krome do, oni volas aliĝi kiel membro al nia eklezio, oni devas tion fari eksplicite — persone. Do nepre ne eblas ke oni membras, nur ĉar tion deziris siatempe la gepatroj. Oni mem devas tion decidi. Por membriĝo oni verku sian propran kredkonfeson tute personan. Ni ne posedas nek rekonas fiksformajn kredkonfesojn, kiujn la homoj glutu kvazaŭ tutaĵe… Se vi kredas ion, se vi fidas je Dio — do faru ĝin laŭ via persona sincera maniero… Jen kion ni nomas liberala kristanismo. Do tiamaniere la leganto komprenos, ke pluraj kiuj ja sufiĉe aktive jam pli ol jaron partoprenis en ĉi diskutogrupo eklezia samtempe povis esti entute membro de neniu eklezio…

*Oni ja povas esti baptita, same infanoj, eĉ beboj, kiel adoltoj, sed pere de la bapto laŭ nia kredo oni membriĝas en la “Eklezio de Jesuo Kristo”*

La hodiaŭa kunveno havis kiel temon la estiĝon de la Nova Testamento. La temojn ni fiksas kune; komence de la sezono ni iom inventaras la dezirojn kaj ideojn por poste pritrakti ilin, ĉu tiel ke unu el ni anticipe trastudu, tralegu certan libreton aŭ eseon, por iom enkonduki la temon, ĉu tiamaniere ke ni ĉiuj anticipe nin preparu… Tio dependas de la temoj. Pasintsezone ni estis interkonsentintaj, ke ni komencu la novan sezonon en septembro per la estiĝo de l’ Nova Testamento. Kaj ĉar tio estas tre eksplicite mia fako, mi do enkondukis ĝin. Mi disdonis kelkajn foliojn kun datoj, nomoj, skizoj; mi rakontis. Ili interrompis min iam tiam se estis io ne klara. Poste estiĝis komuna interparolo. Komence klare ligita al la temo, sed fine de la vespero la temoj disiĝis kaj formiĝis kelkaj propraj rondetoj, kiuj amiketose distriĝis. Estas ja bone serioze paroli, sed oni ne troigu, ĉu?

Preskaŭ nokto-meze ni disiĝis. Post monato denove ni nin trafos, sed tiam en urbeto T*. Tiam Sebastiano traktos pri tio, kial li fariĝis profesia militisto; kaj Fred, kial li rifuzis militservi. Ne estas la intenco, estigi kverelon, sed male provi klarigi reciproke, kial oni faris tian elekton kaj kiom tio rilatas al kristana vivo.

ᘐ

# SEKRETARIA JARRAPORTO PRI LA JARO 2004

Kompilita de Els VAN DIJK-KUPERUS

Post unu jara interrompo denove mi kompilas modestan jarraporton. La elektronika poŝto plifaciligis la internaciajn kontaktojn sed mi ne scias ĉu multaj membroj uzis ĝin por kontakti unu la alian. Ĝenerale mi ricevis malmultajn informojn pri la membro-agado.

Philippe Cousson denove prizorgis la ttt-paĝon de KELI en la interreto; http://www.chez.com/keli.

Pavel Polnický organizis kun sia frato la Kristanan Kongreson de K.E.L.I. en Ĉeĥio. La partoprenantaj membroj aprobis en la jarkunveno la prezidantecon de Philippe Cousson. Li postsekvis Jacques Tuinder kiu restis estrarano. Ni bonvenigis novan estraranon Samuel Gaillard el Francio. En la sama kunveno montriĝis ke Dia Regno ne plu havus redaktoron ekde la komenco de 2005. Feliĉe anoncis sin nova redaktoro. La estrarano Bengt Olof Åradsson deklaris sin preta fariĝi redaktoro.

En la aŭtuno de 2004 trovis Pavel Polnický presejon en sia loĝloko kaj li ankaŭ estis preta dissendi Dia-n Regno-n. Redaktoro ne povas sole plenigi revuon. Tial mi petas vin sendi viajn kontribuojn al li. En la jarkunveno ni dankis Philippe Cousson kiu dum tiom da jaroj redaktis Dia-n Regno-n. Al Kazimierz Leja, la antaŭa eldonisto kaj presisto mi sendis dankleteron kaj donacon. Grava perdo por K.E.L.I. estis la forpaso de Adolf Burkhardt, la granda motoro de kongresoj kaj kantlibroj kiel “Adoru Kantante” kaj la liturgia libro “ADORU”. Por mi 2004 estis la jaro de la forpaso de mia edzo.

Esperanto-Misio ne plu funkciis. La problemo de la restanta materialo ne estas solvita.



Kelkaj el la aro de partoprenantoj en la 2004a KELI-kongreso

## Diservoj:

En Germanio okazis ekumena diservo en la kadro de la 81-a Germana Esperanto-Kongreso. La pastroj Peter Baes kaj Albrecht Kronenberger celebris en la preĝejo de Sankta Johano. En la kongresejo estis du matenaj preĝoj.

La Londona Esperanto-Diservo restis la nura kiu ankoraŭ funkciis. Ĝi estis la plej malnova, regula diservo en

Esperanto en Britio kaj verŝajne en la mondo. Ĝi ekfunkciiĝis longe antaŭ la unua mondmilito. Dum la Brita Kongreso de Esperanto en Felixstowe okazis je dimanĉo, la 2-an de majo, diservo en la preĝejo Sankta Edmund.

Kadre de la Universala Kongreso en Pekino okazis ekumena diservo dank'al la kunlaboro de pastro Bernhard Eichkorn.

Erikas Laiconas el Litovio gvidis ekumenan diservon dum la Baltaj Esperanto-Tagoj.

La 11-an de decembro organizis nia nova estrarano Samuel Gaillard en Clermond-Ferrand kristnaskan celebradon en Esperanto kun samtempa traduko en la Franca.

Pri la diservo kaj matenaj preĝoj dum la K.E.L.I.-kongreso mi jam raportis.

## Sekcioj:

La prezidanto de la **finna** sekcio, Olavi Kantele, pretigis kaj forsendis kontaktilon kun la nomo "Cirkulero" kvar fojojn jare. Ĝi estis dulingva kaj informis pri eventoj.

La multjara reprezentanto por **Rusio, Bjelorusio, Ukrainio kaj Kazaĥio** estis Larisa Kuzmenko. Ŝi raportis pri la membroj. Dekkvin membroj havis per-leterajn kontaktojn krom tiuj, kiuj loĝis en ŝia loĝloko, N.Tagil. Dum la vintraj Zamenhoftagoj en Jekaterinburgo partoprenis ankaŭ kvin kristanaj esperantistoj. Ili eluzis la renkontiĝon kaj komune kantis kristanajn himnojn. Poste okazis vizito al la ĉefpreĝejo. La grupo festis Paskon kaj helpis al malriĉaj homoj precipe per legomoj kaj vestaĵoj. Dia Regno estis regule legata en la klubo kaj poste sendita al esperantistoj en aliaj urboj.

La **germana** sekcio kunvenis kadre de la Germana Esperanto-Kongreso, la 29-an de majo.

La nova prezidanto Wolfram Rohloff kaj la kasistino Astrid Hanke deĵoris en la informstando pri Esperanto de la Katolika Esperanto-Unuiĝo dum la Katolikaj Tagoj en Ulm. Ili ambaŭ legis bibliajn tekstojn en la rom-katolika diservo.

Dank'al Tom Neil aperis kvar fojojn jare la oficiala organo, "Kristana Alvoko", de la **brita** sekcio. La 2-an de majo okazis la jarkunveno post la diservo.

La **nederlanda** sekcio bedaŭrinde konstante malkreskis same kiel la plej multaj alilandaj sekcioj. Kadre de la semajnfina renkontiĝo de Esperanto Nederland estis organizata interreligia kunveno.

La 24-an de aprilo kolektiĝis kelkaj **svedaj** kelianoj en Stockholm por la jarkunveno. Kvin svedoj partoprenis la K.E.L.I.-kongreson.

En **Litovio** estis Erikas Laiconas la kontaktpersono. Ne plu povis okazi K.E.L.I.-kunveno en Kaŭnas. Erikas eldonis plurfoje jare la revueton "Litovia-n Kristano-n" kaj eble ĝi ne plu aperos en 2005. Li salutis la partoprenintoj de la I.K.U.E.-kongreso en Litovio nome de K.E.L.I.

Kun la estraro de K.E.K.O. (Kristana Esperantista Konga Organizo) en la **Demokrata Respubliko Kongo** estis



Plejmultaj estraranoj

kelkfoje retkontaktoj. Dia Regno estis sendata kaj malgranda monsumo.

Jerald Veit restis la reprezentanto en **Usono** kaj li prizorgis bibliajn tagajn tekstojn en Esperanto pere de la interreto.

Mi venas je la fino de mia raporteto dankante ĉiujn personojn kiuj sendis bultenojn kaj informojn al mi. Elkore mi dankas la estraranojn kaj aliajn aktivulojn por ilia kunlaboremo.

Unuiĝo ne povas vivteni sin sen aktivaj membroj. Ĉu K.E.L.I. estonte sukcesos en tio, tio plene dependas de ni ĉiuj.

Estraro de K.E.L.I.: inter krampoj la fino de ĉies deĵorperiodo:

Philippe Cousson, prezidanto (2007); vic-prezidanto vakas; Els van Dijk, sekretario (2007); Siegfried Krüger, kasisto (2005); Bengt Olof Åradsson, redaktoro (elektita en 2004, do deĵorperiodo ĝis 2007); membroj: Pavel Polnický (2005); Zoltán Somhegyi (2007); Britta Rehm (2007); Irén Bagi (2006); Samuel Gaillard (2007).

---

# TAGORDO DE LA JARKUNVENO DE KELI 2005

1 Malfermo
2 Elekto de la kunprotokolantoj
3 Fikso de la tagordo
4 Komunikoj
5 Funebra memorigo
6 Sekretaria jarraporto
7 Kasista jarraporto
8 Raporto de la kaskontrolantoj
9 Buĝetoj
10 Raporto de la redaktoro
11 Estrarelektoj
12 Kongresaj planoj
13 Ideoj kaj sugestoj de la membroj
14 Fermo

Ĉi-jare finiĝas la deĵorperiodo de la kasisto Siegfrid Krüger kaj de Pavel Polnický. Ili estas reelekteblaj. La kasisto petas serĉi posteulon kaj la sekretariino jam estas serĉata dum pluraj jaroj.

Ne estas kongresaj planoj por 2006. La sekvontan jaron estu denove KELI-kongreso. Sed kie? La estraro ne povas solvi tiun problemon sen subteno de la membroj.

# Ĉiuj subtenantoj de la Esperanta Di-servo Londona

Kun granda bedaŭro mi devas sciigi al vi, ke la kristana rondo, kiu okazigas la Di-servojn en Esperanto ĉiumonate en Londono, decidis ripozigi la aranĝon ekde julio. Nun ni estas tre malmultnombra grupo, kaj se unu el ni devas foresti dum iu Di-servo, estas tre malfacile gvidi la adoron en Di-serva etoso. Niaj monrimedoj estas malgrandaj kaj post iom da tempo elĉerpiĝos, kaj ni deziras fini ĉi tiun longan serion de Di-servoj sen financa ĝeno, kaj memorante la bonajn okazojn – imponajn Di-servojn, kaj gajajn sociajn renkontiĝojn ĉe diversaj preĝejoj (kaj laŭ la protokoloj, manĝaĵojn en diversaj kafejoj; sed tio estis antaŭ mia partoprenado).

Ekde la fondiĝo de la Di-servoj en oktobro 1912 per s-ro Montague C Butler – kies himnaron ni ankoraŭ ofte uzas – nia aranĝo daŭris preskaŭ 93 jarojn, kaj okazis en diversaj preĝejoj. Aparte allogaj estis la festaj Di-servoj, kristnaskaj kaj aliaj, kiam vizitis nin la Londona Esperanto-Ĥoro. Post la Di-servoj ĉiam la adorintoj temanĝis kaj babilis en Esperanto; kaj la kunvenoj de la komitato estis en Esperanto. Vizitis nin ankaŭ nekristanoj por la etoso kaj la ŝanco aŭdi kaj paroli la interlingvon; kaj foje ĉeestis ne-esperantistoj, kiuj ĝenerale ricevis bonan impreson, ke ni ne estas stranga aparta sekto, kaj rekonis la kantojn, kiujn ni uzas. La Di-servoj tiel estas atesto al la mondo pri nia kredo, pri nia lingvo, kaj ke ambaŭ povas kunfandiĝi en kosmopolita kaj anglalingva, multkreda, multreligia Londono.

Kiel mi menciis en mia antaŭa ĝenerala letero, mi intencas esplori la eblecon provizi esperantlingvajn adormaterialojn en la Tut-Tera-Teksaĵo. Mi bonvenigus komentojn pri tio, kaj pri la ebleco disponigi tian materialon al tiuj, kiuj ne havas ret-aliron.

Mi intence uzis la vorton "ripozigi", ĉar neniu el ni (laŭ mi) kredas, ke neniam estos restarigitaj laŭregulaj Esperantlingvaj Di-servoj en Londono. Ni restas fidelaj al la originaj antaŭirintaj pioniroj. Kiam Esperanto estos pli uzata en Eŭropo (almenaŭ), kio frue-malfrue okazos pro la fiasko de la traduk-buĝeto, kaj pro la pligranda integriĝo de la kontinento kun ties permeso de pli libera migrado, tiam eble ni havos ŝancon. Eble la restarigota aranĝo estos malsimila al la nia, sed estas certe, ke Dio ĝin benos same, kiel li benis la nian. Ni metas nian estontecon en liajn malavarajn manojn. Eble oni almenaŭ organizos celebron je la 100-jara festo de nia naskiĝo.

Ĝis tiam, ni ankoraŭ ĝoje bonvenigas vin al niaj finaj du Di-servoj antaŭ la "ekdormo", kiuj okazos la 12an de junio kaj la 10an de julio en la ĉambro "Parlour" de la metodista preĝejo de Hinde Street, Londono W1, je 15h15. Post la Di-servoj kiel kutime ni babilos Esperant-lingve kaj temanĝos per kunportitaj manĝaĵoj. Mi gvidos la junian Di-servon kaj Martyn McClelland - la finan.

Ni dankas al vi pro via daŭra subteno, kaj dum la jaroj pasintaj, kaj dum ni preparas la ripozigon, kaj dum la dormo. Propetu de la Sinjoro pli helan tagiĝon.

Elkore, Kevin BOURNE, sekretario

# MI ESTAS KIU ESTAS – PARTO 3

## MI ESTAS LA LUMO DE LA MONDO (Joh 8:12; 9:5)

pastoro Bayo AFOLARANMI

### Enkonduko

La tria parto de nia studo de la grandaj "MI ESTAS-diraĵoj" de Jesuo Kristo prezentas Lin kiel la Lumon de la mondo kaj la Fonton de lumo por ĉiu kiu sekvas Lin.

> *"Mi estas la lumo de la mondo; kiu min sekvas, tiu ne iros en mallumo, sed havos la lumon de la vivo"* (Joh 8:12)

### Kristo, la lumo de l' mondo

La mondo estas en spirita mallumo de malvirto, peko, kaj nescio (Jes 9:2; Joh 3:19–20). Ĝi estas kiel la tempo de kreado kiam *"la tero estis senforma kaj dezerta, kaj mallumo estis super la abismo"* (Gen 1: 2). Ĉi tiu spirita mallumo farigis la mondon malakcepti la proponon de savo. Tial, Jesuo Kristo deklaris kuraĝe, *"Mi estas la lumo de la mondo; kiu min sekvas, tiu ne iros en mallumo, sed havos la lumon de la vivo"* (Joh 8:12). Dum Li estis kuracanta la viron kiu estis naskita blinde, Li reasertis ĉi tion. Jesuo Kristo estas la Lumo, ne iu lumo inter aliaj (vidu: Joh 1:9). Li egaligis Sin kun Dio. *"...Dio estas lumo, kaj da mallumo estas en Li neniom"* (1 Joh 1:5). Laŭ la lingvo de la Sankta Biblio, lumo simbolas Dion kaj Lian sanktecon. Kiel ordinara lumo malkaŝas ĉion en malluma ĉambro, Dio (Jesuo Kristo) kiel la Lumo de la mondo estas la Malkaŝanto de ĉiu peko (Joh 3:19–20).

### La impliko de la diraĵo

Jesuo Kristo estas la ununura persono kiu povas lumigi kaj malkovri la mallumon de malvirto, peko, kaj nescio je niaj vivoj. Kiu ajn kiu akceptas aŭ sekvas Lin havos malsaman vivon – vivon de lumo (Joh 8:12b). Kiel nuba kaj fajra kolonoj kondukis la popolon izraelan (Eli 3:21–22), Jesuo Kristo kondukos vian vivon. Vi havas kunecon kun Li. Efektive, via lumo kondukos aliajn homojn (Mat 5:14–16).

> *"Dum mi estas en la mondo , mi estas la lumo de la mondo."* (Joh 9:5)

### Konkludo

Ĉu vi akceptas Jesuon Kriston por lumigi la mallumon de via vivo? Vi ne povas adori Lin kiel Dion kaj la Lumon de la mondo se vi ankoraŭ vivas en mallumo (1 Joh 1:6–7).

16-23 julio 2005
Pilis-csaba
Ekumena Kongreso
IKUE - KELI

# El la kongresa programo

kompilita de Éva Farkas-Tatár
kaj la loka komitato

Karaj gefratoj, jen estas nia programo. Tio ankoraŭ ne ĉie estas detale plenigita, sed ni volas jam nun informi vin pri la ĉefaj punktoj. Kelkaj programeroj estas pli malpli konstantaj: 7 Sankta Meso; 7.30 komuna preĝado; 8 matenmanĝo; 12 preĝado; 13 tagmanĝo; 16 kantado; 16.30 prelego aŭ forumo kun enkonduko; 18.30 vespermanĝo; kaj vespera preĝo je la fino de la tago.

**Sabate:** Alveno povas okazi dum la tuta tago, ni deĵoros tie kaj akceptos vin ĉe la fervoja haltejo "Pazmaneum", kiu estas antaŭ la vilaĝa haltejo de Piliscsaba. La valizojn kaj tiujn, kiuj tre malfacile marŝas, ni transportigos al la kongresejo, poste ni promenos al la kongresejo 10-12 minutojn. Posttagmeze estos la registriĝo, vespermanĝo, malfermo kaj je la 21-a Sankta Meso kaj komuna vespera preĝo.

**Dimanĉe:** 10 Meso; malferma Diservo. De la 16-a horo ni konatiĝos kun la impona, moderna Katolika Universitato Pázmáneum, en kies studenta hejmo ni kongresos. Je la 20-a ni havos folkloran muzikan programon.

**Lunde:** 9.30 Dr prof Endre Dudich, vicprezidanto de Hungaria Esperanto Asocio prelegos pri la historio de miljara kristana Hungario. 20 Lumbildoj por prepariĝi al la tuttaga ekskurso merkrede al Budapeŝto, projekcios Ágnes Ráczkevy-Eötvös.

**Marde:** 9.30 prelegos Siegfried Krüger, 11 Zoltán Somhegyi preparos nin por la posttagmeza ekskurso al la proksima urbo Esztergom, iama reĝa sidejo, fama pri la Kristana Muzeo kaj la impona katedralo. 14 ekiro al Esztergom. Tie ni komune rigardos la muzeon, la katedralon, sed eblas elekti kaj grupe viziti vidindaĵojn laŭdezire, promeni tra la ponto al Slovakio (kunportu legitimilon/pasporton!) kaj tie ĝui sanigbanejon. Reveno libere vespere per trajno, kiu ofte trafikas.

**Merkrede: la** tuttaga ekskurso al Budapeŝto, kiu komenciĝos en la Matias-preĝejo en la fortikaĵ-kvartalo. Ĝi estas fama kaj belega historia monumento, krome estas favorata koncertejo. Tie ni havos eblecon celebri la Sanktan Meson esperantlingve kaj ankaŭ uzi la faman orgenon. Poste ni havos la eblecon dum 1 horo viziti la imponan parlamentejon ĉe la Danubo. Ni tagmanĝos la lunĉpakaĵojn kaj ripozos en la Urba Parko, apud la placo de Herooj, kie troviĝas 4 muzeoj, banejo Széchenyi kaj Zoo. Ni povos en 4-5 pli malgrandaj grupoj elekti kion viziti el inter ili. De tie per la ĉarma,

malnova subtera fervojo oni povas rekte kaj rapide eniri en la centron de la urbo, se iu deziras tie ĉirkaŭrigardi kien oni ne povas iri per aŭtobusoj. Post vespermanĝo en la kutima loko kaj tempo, ni povos rigardi la filmon, kiun Maria Beloŝeviĉ prezentos al ni.

**Ĵaŭde**: post la kutima komenco, je 9.30 okazos la jarkunvenoj de ambaŭ asocioj, kiuj daŭros plu ankaŭ post la kafo-paŭzo. Posttagmeze – diservo kun Sankta Manĝo por la protestantoj. Vespere je la 20-a estos muzika programo.

**Vendrede:** laŭ la kutima ordo okazos ĉio matene, antaŭtagmeze ni havos du prelegojn, aŭ nur unu kaj post la paŭzo ni pridiskutos la temon eble en grupoj. Posttagmeze estus bone resumi ĉu vere ni spertis en la praktiko, ke Jesuo Kristo liberigis nin. Vendrede vespere por la adiaŭa vespero ni esperas iun programon de niaj gejunuloj-infanoj kaj sur kelkaj aliĝiloj ni trovis proponojn por kontribuo.

**Sabate:** okazos oficiale la ferma kunveno, sed laŭ la spertoj multaj ekiras post la matenmanĝo. Ni havos varman tagmanĝon, sed kiuj forveturos ricevos lunĉpakaĵon.

Kun ĝojo ni akceptis 16 gejunulojn. Kvin el ili estas sub 10, kaj dekunu inter 11 kaj 15 jaroj.

Julia Sigmond /RO/, Sarolta Sudár /HU/, Ingeborg van Dijk /NL/ kaj Samuel Gaillard /FR/ zorgos pri ilia programo, instruado kaj ludoj.

En la apudeco de Piliscsaba troviĝas vizitindaj historiaj ekskurslokoj, memorlokoj, mirindaj elvidejoj kun iom da monto-grimpado, kiujn entreprenemaj grupetoj povos viziti eĉ dum la posttagmanĝa paŭzo. Pri tiuj lokoj haveblos informoj ĉeloke.

En la urbeto mem estas malgranda naĝejo kun saŭno, ankaŭ vizitebla. Ĝin funkciigas movhandikapitaj homoj, kiuj havas ankaŭ aliajn metiejojn kaj loĝas en praktikaj domoj. Tiu centro "Memstara Vivo" de movhandikapitoj havas la nomon "SILO" kaj estas kristana fondaĵo. Ili volonte atendas vizitantojn!

Estos kontribuaĵoj pri kiuj ni nun ankoraŭ ne scias. Ni multon atendas de la matenaj preĝoj, kiuj ekirigas la tagojn kaj de la tagfinaj meditadoj kaj preĝoj. Ni petas vian helpon, proponi vin mem aŭ aliajn.

Tiuj, kiuj ankoraŭ ne aliĝis, trovas la aliĝilon en numero 1/2005 de Dia Regno aŭ sur la ttt-paĝo:

http://www.chez.com/keli/

ꟹ



Inter alie estas videblaj la Parlamento, Danubo, Lánchíd (ĉenponto), Reĝa kastelo
Vidu sur interreto ekz: http://www.hungario.hu/ kaj http://eo.wikipedia.org/wiki/Budapest

LA PROFILO

# ESTRARANO KAJ SEKRETARIO ELS VAN DIJK-KUPERUS

**De tempo al tempo** demandis min esperantistoj kaj ne-esperantistoj: *"kiam kaj kial vi eklernis Esperanton?"* Same kiel ĉe multaj el vi estis la konatiĝo la rezulto de hazardo. Mi aŭdis unuan fojon pri Esperanto en la jaro 1967 kiam presbitero de nia Reformita Eklezio en Leiden vizitis mian patrinon. Mia patro mortis en 1964 kaj mia patrino postrestis kun 3 filinoj el kiuj mi estis la plej aĝa.

**La presbitero** por nia kvartalo estis s-ino Jelly Koopmans, konata al multaj el vi. Ŝi estis kun sia edzo Wim, la motoro de la Esperanto-instruado en Leiden. En ŝia hejmo mi konatiĝis ankaŭ kun K.E.L.I.



**En la jaro 1967** aŭ 1968 mi partoprenis unu tagon de la Universala Kongreso en Rotterdam kaj en 1969 mi vojaĝis kun Jelly al K.E.L.I.-anoj en Svedio kaj tuj poste al nia kongreso en Kiljava (Finnlando) kaj la Universala Kongreso en Helsinki. Interesis min la eblecoj pere de Esperanto renkontiĝi kun diversnaciaj homoj kaj diversnaciaj kristanoj.

**Post la naskiĝo de mia filino** Ingeborg en 1974 mi ne estis aktiva en la Esperanto-medio same ne en mia profesia laboro kiel instruistino. En la Ekumena Kongreso en Dalfsen (Nederlando) en 1981 okazis mia re-apero en K.E.L.I. kaj en la sama kongreso mi fariĝis sekretariino de nia Ligo.

**Mia profesia laboro** denove vokis min en la sama jaro. Vi divenu kiam mi festos la 25-an datrevenon de mia sekretaria laboro en K.E.L.I! Mia edzo kaj filino ofte akompanis min al kongresoj. Jaap mortis pasintan jaron pro kancero post ses-jara periodo de malsano. Nia filino ege bone parolas Esperanton kaj ŝi estis la prezidanto de la Nederlanda Esperanto-Junularo dum kelkaj jaroj.

**Esperanto okupis grandan parton** de nia familia vivo kaj mi estas dankema ke mi iam konatiĝis kun Jelly Koopmans.

## Financa Raporto de KELI 2004 (Ĉiuj sumoj en EUR)

| | | Bilancoj fine de la jaroj | |
|---|---|---|---|
| | | **2003** | **2004** |
| **Aktivoj** | PB-Ĝiro (PB = Postbank NL) | 1.508,03 | 4.972,75 |
| | PB-Kapitaalrekening (3%) | 26.783,69 | 27.500,29 |
| | UEA-konto kelk-p | 2.465,95 | 1.284,00 |
| | Kasista kaso | 134,62 | 0,00 |
| | E-Misio, Laiconas | 304,59 | 346,16 |
| | *Monrimedoj* | *31.196,88* | *34.103,20* |
| | Kuranta konto K. Leja | 1.641,10 | 1.453,99 |
| | Stokoj (libroj) | 4.857,53 | 3.151,20 |
| | E-Misio, Kasedoj D.K. | 211,70 | 211,70 |
| | *Provizo* | *5.069,23* | *3.362,90* |
| | Transitaĵoj | 567,00 | 371,29 |
| | **Aktivoj sume** | **38.474,21** | **39.291,38** |
| **Pasivoj** | Kapitalo | 4.587,86 | 4.291,53 |
| | Saldoj negativa/positiva | **-136,33** | **1.236,49** |
| | *Kapitalo entute* | *4.451,53* | *5.528,02* |
| | Dumvivaj membroj | 2.614,73 | 2.637,11 |
| | E-Misio | 7.908,97 | 8.422,29 |
| | Helpa kaso | 2.268,37 | 2.368,37 |
| | Junulara helpa kaso | 337,45 | 337,45 |
| | Kongresa reserva kaso | 1.771,25 | 1.891,53 |
| | Literatura/Himnara kaso | 12.427,86 | 12.138,77 |
| | Informada/Varbada kaso | 54,72 | 214,72 |
| | Legaco C.P.W. | 2.268,90 | 2.268,90 |
| | Legaco E.t.O.-W. | 2.268,90 | 2.268,90 |
| | *Fondusoj entute* | *31.921,15* | *32.548,04* |
| | Pasivo | 1.180,00 | 570,00 |
| | Kreditoroj | 450,58 | 450,58 |
| | Transitaĵoj | 470,95 | 194,74 |
| | *Pasivoj* | *2.101,53* | *1215,32* |
| | **Pasivoj sume** | **38.474,21** | **39.291,38** |

## Rezulto 2004 kaj buĝetoj 2004, 2005 kaj 2006 (Ĉiuj sumoj en EUR)

| | Buĝeto 2004 | Rezulto 2004 | Buĝeto 2005 | Buĝeto 2006 |
|---|---|---|---|---|
| **Elspezoj** | | | | |
| Presisto | 3.700 | 3.487,72 | 2.580 | 2.700 |
| Perantoj | 20 | 20,00 | 20 | 20 |
| *Revukostoj* | *3.720* | *3.507,72* | *2.600* | *2.720* |
| Prezidanto | 20 | 0 | 20 | 20 |
| Sekretario | 60 | 28,87 | 60 | 60 |
| Redaktoro | 120 | 160,00 | 200 | 200 |
| Kasisto/Matrikulisto | 70 | 42,77 | 50 | 50 |
| *Estrarkostoj* | *270* | *231,64* | *330* | *330* |
| UEA-kotizo | 54 | 54,00 | 54 | 60 |
| Ĉambro de Komerco | 35 | 30,41 | 35 | 35 |
| Kaskontrolo | 35 | 37,60 | 40 | 40 |
| Bankkostoj | 20 | 37,58 | 35 | 35 |
| Merituloj | 20 | 80,00 | 30 | 30 |
| UK Lukostoj | 140 | 140,00 | 140 | 140 |
| *Ĝeneralaj kostoj* | *304* | *379,59* | *334* | *340* |
| Librovendado (kostoj) | 0 | 2361,03 | 1.200 | 1.200 |
| Varbado (Inf./varba kaso) | 25 | 0 | 50 | 50 |
| Rabatoj de Perantoj | 20 | 35,00 | 30 | 30 |
| *Aliaj elspezoj* | *45* | *2.396,03* | *1.280* | *1.280* |
| **Elspezoj entute** | **4.339** | **6.514,98** | **4.544** | **4.670** |
| **Enspezoj** | | | | |
| Kotizoj/Abonoj | 3.300 | 2.949,56 | 2.850 | 2.800 |
| Kotizpagdiferencoj | 0 | -5,00 | -10 | -10 |
| Librovendado | 200 | 2.656,92 | 1.500 | 1.500 |
| *Kotizoj entute* | *3.500* | *5.601,48* | *4.340* | *4.290* |
| Rentumoj | 500 | 298,08 | 400 | 350 |
| Adopta Kaso | 450 | 683,91 | 700 | 600 |
| Profito el kongreso | 0 | 1.168,00 | 0 | 0 |
| *Aliaj enspezoj* | *950* | *2.149,99* | *1.100* | *950* |
| **Enspezoj entute** | **4.450** | **7.751,47** | **5.440** | **5.240** |
| **Saldoj** | **111** | **1.236,49** | **896** | **570** |

## KLARIGOJ KAJ RIMARKOJ PRI LA BILANCO 2004-12-31

**Aktivoj**

Kuranta konto K.Leja: Repagenda el kredito, antaŭpago kaj pro ŝanĝo de la eldonejo

Stokoj: Sanktaj Biblioj (8), Biblio nova NL (34), Biblio nova PL (220), Novaj Testamentoj broŝ. (73), Novaj Testamentoj bind. (29), Evangelioj laŭ Johano (237), Adoru Kantante (9), Nia historio (6), Esperante kaj Ekumene (7).

La libroj estas parte stokataj ĉe Els van Dijk (NL) kaj Jacques Tuinder (NL).
La plej granda parto de la biblioj stokas por ni Bernhard Eichkorn (DE).

E-Misio kasedoj: Dimanĉa koncerto (73),
La vendontoj estas petataj kontakti la kasiston.

Transitaĵo: Rentumo el Kapitaalrekening 2004 estas 371,29 EUR (ricevota en 2005)

**Pasivoj**

| | | |
|---|---|---|
| Kapitalo: | Estas la libera kapitalo, alian vidu sub Fondusoj | |
| Saldo positiva: | 1236,49 EUR | |
| Helpa kaso: | Estas por helpo al nepagipovaj membroj partopreni kongreson. | |
| Kreditoroj: | Hungara kaso | 355,33 EUR (Iren Bagi), |
| | Brita kaso | 95,25 EUR (Diana Richardson) |
| Pasivoj: | El ricevo de kongreskotizo | 570,00 EUR, |
| Transitaĵo: | Antaŭricevitaj kotizoj | 194,74 EUR |

## KLARIGOJ PRI LA REZULTO 2004 KAJ LA BUĜETOJ 2005/2006

Kotizoj pagendaj de

| | | |
|---|---|---|
| Membroj individuaj | 146 | (158) |
| Membroj familianaj | 13 | (13) |
| Membroj subtenantaj | 3 | (3) |
| Membroj dumvivaj | 21 | (24) |
| Membroj adoptitaj | 150 | (156) |
| | 333 | (354) |

| | | |
|---|---|---|
| Nuraj abonantoj | 25 | (23) |
| IKUE-abonantoj | 20 | (20) |
| | 45 | (43) |

Malkreskas la membraro, grandparte pro maljuniĝo. Modeste ni gajnis novajn membrojn kaj abonantojn, sed ne sufiĉe por prosperi.

Librovendado: La kostoj aŭ enspezoj por librovendado influas la saldon.

Adopta Kaso: Mono donacita de la KELI-membraro por membroj, kiuj ne povas pagi la kotizojn aŭ nur parte. Estas membroj en Albanio, Afriko, Bulgario, Ĉeĥa Respubliko, Ĉinio, Estonio, Hungario, Jugoslavio, Latvio, Litovio, Pollando, Rumanio, Rusio. Ili estas petataj kontribui "laŭforte" (kotizo laŭ interkonsento kun la landa peranto). Koregan dankon al ĉiuj donacintoj kaj donacontoj. En 2004 enfluis 683,91 EUR.
Kotizoj hungaraj 160,00; polaj 13,000; ĉeĥaj 120,00; rumanaj 25,00 EUR.
Donacoj brita KELI-sekcio 170,00; finna 90,00; nederlanda 30,00 EUR.
Unuopaj membroj entute 93,91 EUR

Saldoj 2004, 2005 kaj 2006: Post la profita kongreso en 2004, propra kompostado kaj sendado de DIA REGNO kaj nova eldonejo en Ĉeĥio nia financa bazo estas bona.

Heilbronn, 2005-05-21 **Siegfried KRÜGER**, kasisto

# informetoj




## *Nova!*

LA LASTAJ TAGOJ KAJ RELEVIĜO DE JESUO KRISTO,
16-paĝa libreto kun elektitaj tekstoj el la Nova Testamento.

Petu senpagan presitan ekzempleron ĉe Jerry Veit, espero@milwpc.com

Korajn salutojn
Jerry, Milwaukee

## Saluton, karaj gesamideanoj!

Mi estas ortodoksa kristano, mi studas en Moskva seminario, Rusio. Antaŭ nelonge formiĝis grupeto de miaj kunstudentoj, dezirantaj lerni Esperanton (6 homoj). Unu el ili jam progresis sufiĉe. Ni tre bezonas subtenon de kristanoj el la tuta mondo. Laŭ via eblo bv. sendi bildkarton ordinarpoŝte laŭ adreso:

Ilija Smikov,
RUS-141300, Sergijev Posad,
Lavra, Akademia, Rusio.

Bonvenaj estas korespondproponoj ordinarpoŝtaj aŭ retaj.
Anticipan dankon, Ilija
roke@inbox.ru

## Memore al Anna-Lisa Ahlrén

En la jaro 1968 mi la unuan fojon ĝuis ne formalan akcepton ĉe familio Ahlrén. De tiu tempo niaj kontaktoj estis oftaj ĉar Ĉeĥoslovakio fariĝis ŝia kara, dua patrujo. Tien ŝi multfoje vojaĝis, konatiĝis kun multaj amikoj kaj ankaŭ prelegis (la unuan fojon en la jaro 1969). Iom pli poste altiris ŝian intereson ankaŭ Izraelo.

Ŝiaj aktivecoj en E-o movado kaj KELI estis multnombraj sed malgraŭ ŝiaj aktivecoj multaj certe plej supre taksos ŝian personecon, viglecon kaj sinceran konduton.

Ŝerce ŝi parolis pri si kiel pri simpla dommastrino sed male oni povis paroli kun ŝi pri plej diversaj temoj, ĝui ŝian klerecon kaj klaran vidpunkton.

Niajn multnombrajn renkontiĝojn en nia lando aŭ en Svedio ŝi plenigis per ĝojo kaj vivo, per kelkhoraj babiladoj kaj ankaŭ pensema silento. Por reciproka pliriĉigo de nia tridek sep jara amikeco mi ŝuldas al ŝi multon.

Kun dankesprimo ni memoros tiun ĉi noblan kaj karan fratinon.

Pavel Tichý

# Anna-Lisa AHLRÉN
## 29/03 1924 -- 25/03 2005

En la posttagmezo de la Sankta Vendredo mia kara edzino pace forlasis nian teran rondon. Trafis ŝin antaŭ jarfino cerba tumoro, kiu sufiĉe rapide konsumis la korpan forton.

Anna-Lisa naskiĝis en Leksand, elkreskis en Stokholmo kie ŝi komencis lernejon. Jam kiel 12-jarulino ŝi hazarde ekvidis la Esperanto-insignon sur parencino Anna Alamo, interesiĝis kaj lernis la lingvon en kurso de Signe Boye, patrino de fama sveda poetino Karin Boye.

Tuj poste ŝi komencis korespondadon kun iom pli aĝa hungaro en Pécs kaj tio finiĝis nur kiam li mortis en julio 2003. Sekvis dum la jaroj viglaj kontaktoj kun esperantistoj, pleje sed ne nur Kelianoj.

Anna-Lisa kaj mi pliproksimiĝis en la jaro 1947 kiam venis viziti ŝin nederlanda esperantisto; bakisto kaj bakeja posedanto el Haarlem. Estis ŝia unua renkontiĝo kun eksterlandano kaj mi proponis helpi per pli konata lingvo, se fiaskus. Sed mi fiaskis! Tie ili sidis kaj senhalte parolis, parolis...

En la jaro 1948 Anna-Lisa kaj mi kiel gefianĉoj partoprenis la 48an UK en Malmö (kun Jan Strönne kiel brila "amiralo"). Ni daŭrigis al Haarlem, kie Anna-Lisa en la bakejo fiere prezentis min nova esperantisto! En la menciita UK partoprenis pluraj nederlandaj Kelianoj, kun kiuj ni nun bone amikiĝis: Dirk de Boer, Roel van Spronsen, Tini Putto kaj aliaj. La postan jaron ni fariĝis geedzoj por preskaŭ 56 jaroj.


En Prago sept. 2000

Anna-Lisa donis al mi vivadon nesupozeblan. Ŝi estis lingve lerta kaj flua kaj havis agrablan socieman aperon. Laboron estraran ŝi ne ŝatis. Sian artan talenton ŝi tamen volonte uzis por en la 50-aj kaj 60-aj jaroj per desegnaĵoj pligajigi la komunan programfolion ESTO de la stokholmaj kluboj.

Kongresojn ni partoprenis, kvankam ne tro. Niaj postaj venis nur 1966, en Debrecen (KELI) kaj Budapest (UK). De tiam ni amikiĝis tutvivolonge kun Adolf kaj Grete Burkhardt kaj Anna-Lisa cetere enskribis longan vicon da precipe ĉeĥoj en sian adresaron. En la unua ekumena kongreso KELI/IKUE 1968 ŝi povis revarmigi la kontaktojn kaj aldoni novajn el ambaŭ kategorioj.

La enterigan Diservon la 13an de aprilo partoprenis ĉirkaŭ 60 personoj kaj i.a. nia filino Birgitta Gunnarson laŭtlegis la 23an Psalmon, en Esperanto laŭ propono de l´paroĥestro.

Åke AHLRÉN

## EKUMENECO

Anna LANDFORS

*Ĉu la kredo kiun vi havas*
*por la vivo via gravas?*
*Por mi kredo estas forto*
*del' naskiĝo ĝis la morto.*

*Kaj li mem, Jesuo, diris,*
*kiam li sur tero iris:*
*Mia volo estas tio,*
*Unuiĝu vi en Dio!*

*Sed post li la jaroj pasis,*
*al kristanoj mult' okazis,*
*kaj la branĉoj pluraj estas.*
*Kelkaj malkonsentoj restas.*

*Ĉu ni povus esti nune*
*pretaj por adori kune,*
*preĝi, kanti kaj aŭskulti,*
*reciproke servi multe?*

*Certe branĉon mi bezonas,*
*kiu en la koro sonas*
*kiel mia melodio*
*en la propra eklezio*

*por volonte kun respekto*
*al alies kreddirekto*
*en la Dia amo plene*
*KUNLABORI EKUMENE.*